# Tagiĝo

MONATA INFORM-BULTENO DE
ESPERANTO-ASOCIO DE BRASILIA
Edifício Goiás, Sala 603 -tel.2254761
Caixa Postal 04-0406 -70000 BRASILIA

- MARTO 1980 -

NIA BULTENO - "Tagiĝo" havas tre ambician nomon. Por respekti la tradicion, ĝi devus aperi.....ĉiun matenon, sed nia verda suno ofte paneas, kaj oni vane atendas la bultenon! Tamen, antaŭvide al la Universala Kongreso de 1981, kiu devos esti "aŭroro" de la brazila Esperanto-movado, ni klopodu por ke "Tagiĝo" almenaŭ "monatiĝu" por informadi la esperantistojn pri kio farendas, fareblas, farindas aŭ "farintas" por la disvastigo de la Internacia Lingvo en Brasilia.

NOVA ESTRARO - Kiel anoncite, okazis sabaton la 1-an de Marto, la jara kunveno de nia asocio je ĉeesto de proksimume 40 personoj kaj de pluraj Esperanto-parolantaj infanoj, kiuj donas helan perspektivon al la estonteco de nia laboro. La prezidanto Enivaldo Alves Silva raportis pri la organizaj prepar-laboroj por la 66-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu, kiel konate, okazos en Brasilia de la 25a de Julio ĝis la 1-a de Aŭgusto '81.

Por la periodo 1980-82 estis elektita jena estraro:

| | |
|---|---|
| Prezidanto | : D-ro Enivaldo Alves Silva |
| Vicprezidanto | : S-ro Nelson Pereira de Souza |
| Sekretario | : S-ro Josias Ferreira Barbosa |
| Kasisto | : S-ro Luiz Maurício de Sá Araujo |
| Bibliotekisto | : S-ro Herasmo Leite Soares |
| Kontrol-komitato | S-ro Francisco Mattos de Oliveira |
| | S-ro Mauro Gomes Azevedo |
| | D-ro Waldir Antonio Silvestre |

LABOR-PLANO

Por la 16 monatoj, kiuj separas nin de la Universala Kongreso, la Estraro planas intensigi la lokan agadon por ke la kongreso fariĝu vere prestiĝa evento kaj montru la maturecon de nia movado.

Inter alie, la Estraro decidis regule aperigi nian monatan inform-bultenon, kies respondecon transprenis redakta komitato konsistanta el la sekretario Josias Ferreira Barbosa kaj la membroj Neima Cardoso Adorno kaj Giuseppe Grattapaglia.

KOTIZO POR LA JARO 1980 - La jara kotizo de nia asocio estas fiksita je Cr$ 400,00, kiujn oni povos pagi ĉe la kasisto en la sidejo aŭ per ĉeko.

Ĉar minimuma financa bazo estas esenca por la plenumo de niaj celoj, ni apelacias al ĉiuj gesamideanoj de Brasilia por ke ili kunlaboru kun la nova Estraro pagante akurate sian kotizon.

KURSOJ DE ESPERANTO EN BRASILIA

Pluraj kursoj komenciĝis lastatempe en Brasilia kaj aliaj estas planitaj, depende de la disponebleco de geinstruistoj.

Se inter viaj amikoj kaj konatoj estas personoj interesitaj al la lernado de Esperanto, bonvolu komuniki al ni la adresojn kaj samtempe informi ilin pri la nuntempaj kursoj :

- CEUB : Unuagrada ĉiu marde kaj vendrede de la 18,30 ĝis la 19,20 h
  Por progresantoj, ĉiu lunde kaj ĵaŭde en la sama horaro.
  Instruisto : S-ro Nelson Pereira de Souza
- CIDADE DA FRATERNIDADE, Av. W 5 909 -Asa Norte : Unuagrada, ĉiu sabate de la 9,30 ĝis la 12a h. Instruisto S-ro Josias Ferreira Barbosa
- CENTRO ESPIRITA "Bezerra de Menezes" - Q. 10 Sobradinho : Unuagrada, ĉiu-sabate de la 15,30 ĝis la 16,30 h. Instruisto D-ro Enivaldo A.Silva

---

KUNVENOJ EN LA SIDEJO - La sidejo en Edifício Goiás, sala 603, estas malfermita ĉiu sabate de la 20,30 ĝis la 22,30 h. Informojn pri nia lingvo kaj movado oni povas ricevi ankaŭ ĉiutage ( 9-a / 12-a h.) ĉe la nova sidejo de Brazila Konsilantaro de Esperanto en Edifício Jockey Club, sala 103, tel. 226.1298. Pri la programo de niaj kunvenoj ni daŭre bezonas vian kunlaboron per novaj ideoj kaj aktiva partopreno !

PROGRAMO POR LA VENONTAJ SABATOJ

- 22an de Marto: " Gazetara Vespero" ( Prezentado kaj recenzo de novaj kaj malnovaj Esperanto-periodaĵoj)
- 29an de Marto:
- 5an de Aprilo: Homaĝo al la membroj,kiuj festos dum Aprilo sian naskiĝdatrevenon. La feliĉuloj estas: José Carlos G.Vieira - Fanny Bleisner - Arcelino A.da Rocha - Luiz Mauricio de Sá Araujo - Danton T. da Fonseca - Mauro Gomes Azevedo -
- 12an de Aprilo: Raporto pri la 1-a Kongreso de BKE en Juiz de Fora


PAROLIS PRI NIA ASOCIO

Dum la pasintaj monatoj, "Correio Brasiliense", "Jornal de Brasilia" kaj "Heroldo de Esperanto plurfoje raportis pri la laboro de la esperantistoj en nia urbo,kunlige kun la organizado de la Universala Kongreso, la Jaro de la Infanoj kaj la Semajno de Internacia Amikeco. Tio montras la intereson de la naci-kaj-internaci-lingva gazetaro pri la progreso de Esperanto en nia urbo, al kiu devas celi niaj konstantaj klopodoj.

N-RO 13 (1654) FONDITA EN 1920

## Post du jaroj — la Kongreso en Brazilo

La multjara revo de la brazila Movado finfine realiĝas: post du jaroj por la unua fojo en Brazilo kaj entute en Latina Ameriko okazos Universala Kongreso de Esperanto.



*Akcepto ĉe la guberniestra palaco en Brasilia. De dekstre: Aime Lamaison — guberniestro de Federacia Distrikto Brasilia, José Lins Albuquerque — federacia senatano kaj prezidanto de LKK, Enivaldo Alves Silva — vic-prezidanto de LKK, Nelson Pereira de Souza kaj Carlos Siqueira da Cunha — membroj de LKK.*

HER

DE ESPERANTO

-RO 3 (1661) FONDITA EN 1920

## La Tago de Esperanto en la brazila ĉefurbo

Mankas ankoraŭ unu jaro kaj duono al la 66-a U.K. en Brasilia, sed la Esperanto Asocio de la ĉefurbo jam vigle laboras por krei favoran publikan etoson al la manifestacio.

La 14-an de decembro en la japana ambasadejo, la kulturataŝeo solene transdonis al la infanoj de Bona Espero la du japanajn pupojn, kiujn UEA ricevis el Japanio dum la U.K. en Svislando kaj decidis konservi en la lernejo de Bona Espero.

La manifestacio vekis larĝan atenton de televidstacioj kaj gazetaro kaj la lokaj esperantistoj havis bonegan okazon informi pri la laboro de la esperantistoj en la jaro de la infano, pri la Universala Kongreso kaj pri Esperanto ĝenerale.



sábado, 23 de fevereiro de 1980

CORREIO BRAZILIENSE

● A ASSOCIAÇÃO DE ESPERANTO DE BRASILIA vai promover no período de 17 a 23 de fevereiro a Semana Internacional da Amizade de Esperantistas. O encontro engloba a realização de concursos, palestras e exposições e a entidade brasiliense é filiada a Associação Internacional do Esperanto, que mantém relações de consultas oficiais com o UNESCO e possui associados em mais de 86 países.

DEZIRANTE AL ĈIUJ ASOCIANOJ KAJ AL ILIAJ FAMILIOJ

F E L I Ĉ A N P A S K O N !

NI KORE INVITAS ILIN PARTOPRENI LA VIVON DE NIA ASOCIO .

OOOO